

## La 20an de julio 2016

### Vojaĝo al la nacia parko Oze

Ekde la 13a ĝis la 15a de julio mi vojaĝis al la nacia parko Oze.

Oze estas la 29a nacia parko en Japanio, kiu situas ĉefe en mia gubernio Gunma. Jam antaŭe mi kelkfoje vizitis ĝin, sed ne en la florsezono, do invitive de mia amiko, mi partoprenis en lia karavano.

70% de la tereno de la nacia parko Oze estas posedata de unu privata kompanio TEPCO. Jes, ĝi estas tiu kompanio, kiu okazigis la nuklean akcidenton en Fukuŝima. Kial ĝi posedas Oze-on kaj kion ĝi faras por Oze?

Kiam Japanio modernigis antaŭ cent kelkdek jaroj, oni bezonis elektron kaj la plej granda tasko de la ŝtato estas konstrui akvoenergiajn centralojn.

En 1916 elektra kompanio Tone aĉetis parton de la tereno de la nuna Oze posedatan de privatulo por produkti elektron. Tamen poste okazis granda tertremo en Tokio kaj militoj okazigitaj de Japanio en Ĉinio, pro kio oni ne povis projekti grandegan projekton kiel tiu en Oze. En 1951, kiam TEPCO fondiĝis, ĝi ricevis la terenon de Oze de tiu eksa kompanio.

En la 1960-aj jaroj multaj turistoj komencis viziti Oze-on, kaj pro tio subite ekmalaperis valora marĉo kaj bela pejzaĝo. Tiutempe mankis necesejoj kaj lignaj vojoj en Oze, do la turistoj piedpremis kaj malpurigis la maĉon. Bedaŭrante tion, TEPCO komencis fari lignajn vojojn kaj aliajn necesajn instalaĵojn. Ĝis nun TEPCO faris lignan vojon 20 kilometrojn longan el la tuta vojo 65 kilometrojn longa. Sube, la maldekstra foto montras la detruitan marĉon kaj la primitivan lignan vojon, kaj dekstre, la nunan lignan vojon.



Ni ekiris de mia urbo Maebaŝi je la 7:30 kaj jam post 2 horoj ni atingis la montan pasejon Hatomaĉi, kaj post 40 minutoj da piedpaŝado, ni jam atingis la lokon nomatan Jamano-hana rande de la marĉo Oze-ga-Hara (Marĉa kampo de Oze). Tiu rapideco estas nekredebla afero por mi, ĉar antaŭe ni unue atingis per buso alian montan pasejon kaj de tie ni devis piedpaŝi 2 horojn al Jamano-hana. Turistoj povas tiel facile atingi Oze-on, tamen oni ne permesas al privataj aŭtomobiloj iri rekte al tiu monta pasejo Hatomaĉi, ĉar aŭtomobiloj estas gravaj atencantoj al la nature. Do tiuj, kiuj venas per aŭtomobilo, devas preni aŭtobuson en la suba vilaĝo, forlasante sian aŭtomobilon en la parkejo.


Ni komencis paŝi laŭ la ligna vojo. Nun estas la pluva sezono, do la vetero ne estis tre bela, sed feliĉe ne multe pluvis. Ni trairis la marĉon, kaj posttagmeze atingis la loĝejon en la loko nomata Miharaŝi (Bona videjo). Nia grupo konsistis el akvarelo-ŝatantoj, do atinginte la loĝejon, ili tuj komencis desegni en la teraso sub la tegmento. Ankaŭ mi desegnis kiel sube:



Post vespermanĝo ni iris eksteren por vidi lampirojn. En la tuta mallumo flugis kelkaj lampiroj kun lumeto. Vidu, mi desegnis lampiron en la desegnaĵo.

Ni ĉiuj enlitiĝis la 9an, ĉar por ŝpari elektron oni malŝaltas ĉiujn lampojn krom tiuj en la koridoroj kaj necesejoj.

En la sekva tago en tri grupoj ni promenis en la ĉirkaŭaĵoj. Du grupoj ĉefe okupiĝis pri pentrado kaj unu grupo iris al la kaskado Sanĵoo, Mi partoprenis en la lasta grupo. Ĝi estas 100-metra kaskado kun kvantego da akvo. Reveninte al la marĉo, ni plu promenis kaj ĝuis belajn florojn, sed bedaŭrinde mankis flavaj lilioj (suba foto), kiuj devus plenigi la marĉon. Cervoj, kiuj antaŭe ne loĝis ĉi tie, formanĝis ilin.



Vespere dum la vespermanĝo ni trinkis alkohoraĵon, kiu kostas double pli multe ol en la urboj, tamen tion ni devis akcepti, ĉar ĉiuj manĝaĵoj estas portataj sur la homa dorso. Poste ni ĉiuj kolektiĝis kaj reciproke admiris kaj kritikis la pentraĵojn. Poste mi ludis muzikilojn el la mondo kaj ankaŭ ventroparoladon. Tio tre gajigis la etoson kaj ĉiuj dankis min.

En la tria tago estis pluve, do ni iom rapide revenis laŭ la sama vojo kaj tra Jamano-hana kaj Hatomaĉi, kaj per buso, revenis hejmen.

Laste mi skribos pri la media afero.

1. La ligna vojo estas belege konstruita kaj ni povis vidi, ke foje oni riparas ĝin. Kiam okazis la nuklea akcidento en 2011, TEPCO ne volis zorgi pri la medio de Oze pro financa malfacilo, sed ŝajnas, ke ĝi nun plu zorgas pri ĝi.
2. Japanio nun estas preskaŭ senrubaĵa kaj senrubuja lando. Ni japanoj nun kutimas porti rubaĵojn hejmen, kiujn ni produktas. Sed fakte en diversaj lokoj ankoraŭ troviĝas rubaĵoj. Tamen en Oze mi nenie, vere nenie, vidis rubaĵon. Tio estas mirinda kaj laŭdinda afero.
3. Publikaj necesejoj estas puraj. Oni uzas ĝin kontraŭ 100 enoj (unu eŭro), tamen ne troviĝas kontrolisto ĉe la enirejo. Ni pagas laŭ nia bonvolo kaj ĉiuj pagis.
4. Ankaŭ necesejoj en la loĝejo estis puraj. Ili estas ekipitaj per elektra varmakva ŝprucilo, per kiu oni purigas la sidvangojn, kaj la paperon oni metas en la rubujon apudan. Fekaĵoj kaj paperoj estas aparte sekigitaj kaj transportitaj (kiamaniere mi ne scias, per homa forto aŭ helikoptero?) al la urboj.
5. Ni povas baniĝi en la loĝejo, sed ni ne rajtas uzu sapon. Por brosi la dentojn kaj lavi la vizaĝon, ni ne rajtas uzi dentopaston, nek sapon. Ni purigas nur per akvo.
6. Pri nukleaĵo. Oze situas parte en Fukuŝima, do certe alflugis nukleaĵoj el la detruita centralo. Mi forgesis kunporti dozmetron, do mi vidis la oficialan mezurrezulton de la nukleaĵoj, kaj trovis, ke nun Oze ne estas poluita de la nukleaĵoj el la centralo.

#### Mezurrezultoj

Lokoj	Tagoj	Tempo	Vetero	(mikrosivertoj/h)		
				0m	0.5m	1.0m
1. Hatomaĉi	07/04	13:16	pluvete	0,070	0,064	0,065

2. Jamano-

07/04 07:00 pluvete 0,055 0,062 0,064

hana

3. Meze de la

06/26 08:15 nube 0,017 0,015 0,015

marĉo

\* Lokoj poluitaj pli ol 0,23 mikrosivertoj devas esti purigitaj laŭ leĝoj. La ciferoj en la supraj 3 lokoj estas malpli grandaj ol 0,23, do tio signifas, ke tiuj 3 lokoj ne estas purigendaj, do ne venene poluitaj.